

August Heinrich Hoffmann,  
Alveno de l' printempo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree nun verdiĝas ĉio  
Sur herbejo kaj kampar'.  
Kaj ekestas eŭforio  
Anstataŭe de malklar'.  
Jes, post vintra la sufero  
Printempiĝas je la fin',  
Regas ĝojo sur la tero,  
Tio feliĉigu nin.

Vidu, tie papilio  
Flugas en printemp-ornam',  
Ĝi anoncas, ke nun ĉio,  
Kio mortis, vivas jam.  
Nur violoj rigardantaj  
Jen timeme al la sun'  
Estas kvazaŭ demandantaj :  
« Ĉu printempas vere nun ? »

Vidu, la alaŭdoj tie  
Super ni en la aer' !  
Ili kantas idilie  
Por ni sube sur la ter' !  
Nun forfuĝas la sufero,  
Printempiĝas ĉie ĉi –  
Printempiĝas sur la tero  
Ankaŭ en la Brust' al ni !

*Traduko de la Germana poemo "Frühlings Ankunft" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2011-01-25.*

MR-522-1 / Arg-848-1712 (2013-02-28 19:14:46)